EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ILEI IKEF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 49>** ● AMO 91 ● Ekzamenoj ● Afriko ● IKEF pri trajnoj **< sept. 5**

# AMO 91 – rezultoj el multaj terenoj

Fine de aŭgusto 2022 okazis AMO 91 en Instituto Zamenhof kun ĉeftemo ''Esperanto kaj flega trejnado" (angle: *'coaching'*). Sro GBEGLO Koffi malfermis la seminarion kaj emfazis: 'Mi rajtas sukcesi kaj mi devas sukcesi.'' Li komprenigis ke ĉiu havas talentojn kaj la flegado akompanas tiujn, kiujn oni trejnas dum oni samtempe ankaŭ lernas ĉe la trejnatoj. Do humileco estas devigata ĉe ambaŭ aktoroj. Poste li klarigis, ke Ludoviko Lazaro ZAMENHOF estis granda gvidanto; ĉar en la interna ideo de Esperanto li menciis, ke por pacigi la mondon, la homaro devas havi unu lingvon..

GBEGLO Dzifa sekvis kun subtemo 'Labor-kontrakto'. Tio estas interkoncento inter laborantoj kaj tiuj, kiuj dungas ilin. La daŭro de la kontrakto estas fiksita. Li pritraktis kontrakton laŭ la togolanda leĝo. La skribaĵo estas farita en la oficiala lingvo togolanda. Tri ĉefaj punktoj estis diskutataj: 1- La laboro, kiun faras la laboristo; 2- La salajro; 3- Rilato de subordigo. La dunganto havas devojn kaj rajtojn: Protekti la laboristojn de ĉiuj danĝeroj. La laboristoj devas fari la laboron, kiun oni postulas de ili kaj devas esti pagataj laŭ laboroj faritaj kaj eviti transdoni la sekretojn de la firmao. Ambaŭ la dunginto kaj la dungito devas informi tri monatojn antaŭe por ĉesi labori aŭ forigi la la laboriston.

S-ro KOUNKE Emile prelegis pri Hepatito B. Hepato estas organo en homa korpo, kiu filtras la nutraĵojn. Estas tri diversaj hepatitoj : virusaj, manĝaĵaj kaj medikamentaj. Por la du lastaj estas bazitaj ne estas esploriloj nek kuraciloj, sed per konsiloj oni povos senigi sin je la virusoj. Pri la unua oni havas esplorilojn kaj Medikamentojn. La virusoj eniros en la hepaton por malfunciigi ĝin. Estas diversaj virusoj : la viruso B estas la plej danĝera sed havas novan vakcinon. La koloro de la okulo ŝanĝiĝas : blanka okulo fariĝas flava ; la plej danĝera estas, kiam la okulo fariĝas verda. La plej efika rimedo por eviti tiun ĉi malsanon estas ĉiam lavi manojn antaŭ ol manĝi, konkludis la preleganto.

S-ro GBEGLO Koffi daŭre pritraktis la temon VIVEJO (Lernejo de la Vivo) kaj menciis, ke ''ni lernas por aplikadi tion, kion ni lernis en la vivo por esti feliĉa"j. La mondo en kiu ni vivas estas lernejo de la vivo."

s-ro ATTAGLO Evienyeame Kokou, kiu prezentis la temon « Esperanto kaj la Angla, du internaciaj lingvoj » Li klarigis la simplecon de Esperanto kaj ĝia propredeŭka flanko kontraŭ la Angla, kiu estas multoble pli malfacile lernebla ol Esperanto, kiu

helpas facile lerni aliajn lingvojn. Li iomete parolis pri la Afrika Agado de Esperanto de Hans BAKKER. Poste, s-ro GBEGLO Koffi, diris ke ni esperantistoj havas saman celon, do ni laboru sinergie kiel futbalteamo por venki la alian teamon, sed ni ne batalu inter ni.

Alia temo de la seminario estas : kiel verki kaj eldoni librojn. Tiun ĉi temon prizorgis s-ro ATTIOGBE-AGBEMADON Mensah Biova. Laŭ la preleganto, por fari bonan redaktadon, oni nepre respondu al tiuj demandaj tabelvortoj: kiu, kio, kia, kiel, kie, kiom, kiam, kies . Redakti ĝuste tion, kio okazis, nenion aldonante. Oni povas aldoni komenton.

Notindas ofta interveno de SAGBADJELOU Kokou, kiu prelegis pri la temoj, ‘’Asocio, ĉu ĝi plu necesas en nia E-movada vivo, kial?’’, kaj “Afrika Agado kaj agado de UEA en Afriko”.
Li parolis ankaŭ pri sia libro ’Mia vivo retrospektive’’ dediĉita al siaj gefiloj.



Filmo pri tiu libro, manĝaĵoj, babilado inter seminarianoj kaj grupa fotiĝo en agrabla etoso fermis la 91-an AMO-seminarion.

Koncizigita kaj adaptita el teksto sendita de Gbeglo Koffi.

**NOTO de EKO: La aŭtoro insiste voladas uzi la terminon ‘kooĉado’ misderivita de la angla ‘*coaching*’. SMG kun eĉ pli granda insisto rifuzas polui Esperanton per tiu abomenaĵo kontraŭ la spirito kaj heredaĵo de la angla lingvo. La debato daŭras.**

# Italaj ekzamenoj

Jen filmo pri tio: [Ekzamenoj de Esperanto, Itala Kongreso 2022]

Alessandra Madella

# Ekzamenoj okazigitaj en Madagaskaro

En Madagaskaro, la planita Esperanto-lingva ekzameno de Itaosy-Esperanto-Klubo finiĝis antaŭ kelkaj tagoj, kun disdono de atestiloj al la sukcesintoj en la ĉeesto de veterana esperantistino Lala J. R., la 20-an de aŭgusto 2022. Per afiŝoj en la kluba fejsbuka paĝo, la ĉeforganizinto de la aranĝo, Henriel Fidilalao Firaisana prezentis la




ekzamenrezultojn kaj malkaŝis la nomojn de la sukcesintoj. Oni tiel notas 4 sukcesintojn el 6 kandidatoj, kiuj trapasis ekzamenon ĉe la nivelo baza, laŭ la kriterioj de IEK. Okupis la 1-an ĝis la 4-a rangojn respektive Ranja, Erica, Ny Ando kaj Tatiana.

Tiujn ĉi atingojn ebligis ĝenerala preparkurso, en kiu partoprenis ĉirkaŭ

deko da gejunuloj la 6-an de aŭgusto 2022 en Antoetra Ambohidrapeto, kaj financa subteno de la UEA-programo "Ni Semas". La celo nun estas "kuraĝigi ilin sur la vojo al plena esperantisteco", komentis Henriel. Klopodoj jam estas farataj por pli interesi ilin pri la junulara movado enlanda kaj por certigi la glatan funkciadon de la Esperanto-movado en la venontaj jaroj.

Adjévi Adjé

## Instruado en Etiopio ankaŭ al Somalianoj

Mi estas instruanta kien ajn mi iras, ĉi-semajno mia vojo estis Al la malsanulejo Zewditu kiu estas la plej granda tereno en Addis Abeba. Ili kopis la "Esperantan mini kurso " de la kompitilo. La tekniko de instruado kreskas ĉiutage. En Somalio mi havas islaman amikon el Eritreo, kiu studis en Addis Ababa En Addis Abeba estas granda nombro de somaliaj loĝantoj kaj mi instruas al ili Esperanton .

Laŭ teksto de Habtom Abesinian Espetantida

## Esperanto-kurso ĉeeste en Lubumbaŝo

Fine de julio 2022 okazis ĉeesta Esperanto-kurso en Lubumbaŝo, DR Kongo. Danke al la helpo per instru-materialoj senditaj de Universala Esperanto-Asocio, miaj gelernantoj interesplene sekvis la kurson ĉi-dimanĉan, ĉiu kun lernolibro en siaj manoj. La klubo celas aŭdigi Esperanton ankaŭ sude en Kongo-Kinŝasa, kun intenco forflugigi Esperanton transen. Ni ricevis jenajn librojn: *Poŝamiko, la Zagreba metodo* kaj *Esperanto per rekta metodo*. Se vi sentas vin helpema kaj volas kontribui por la movado en Lubumbaŝo, vi povas ekspedi materialojn: precipe nun ni plej bezonas "**Poŝvortarojn**" por la lernantoj kaj "**Plena Ilustrita Vortaro**" por la instruisto kaj la tuta klubo. Ni estos tre dankaj al vi. Krome, mi gvidas alian Esperanto-klubon per vacapo; ĝi estas aktiva ĉiusemajne kaj havas kuraĝajn, lernemajn gelernantojn, t.e. ke la materialoj por la instruisto helpos ankaŭ por la reta kurso-organizado. Partoprenas lernantoj el landoj svahil-lingvaj, ni estos tre dankaj al vi se vi povos kontribui ankaŭ al la reta klubo per **Datenoj,** ĉar en Kongo-Kinŝasa la interreto kostas multe. En bezono sendi instrumaterialojn, jen la adresoj:

Espoir NGOMA KASATI B.P.1023, Kongo-Kinŝasa: Lubumbaŝo
Telefonnumero: +243 972 716 042; Rete:: espoirkasati@gmail.com

Por pliaj kontaktadresoj: Vacapo kaj telegram: +243 972 716 042 Email: espoirkasati@gmail.com

Espoir NGOMA KASATI, Gvidanto kaj instruisto de ambaŭ kluboj.

## Deklaro pri indiĝenaj lingvoj

La fina deklaro de la UK ekzistas nun en15 lingvoj kaj vi povas trovi ĝin en la pago de la vikio de UEA: https://uea.org/vikio/Deklaro_en_naciaj_lingvoj. ankoraŭ ne ekzistas tradukoj al indiĝenaj lingvoj, kvankam kelkaj estas promesitaj kaj nur en kelkaj landoj estis provoj konigi ĝin al la neesperantista publiko. Se vi povas kaj volas kunlabori pri ĉi tiu agado, bonvolu kontakti min aŭ aliajn membrojn de la labor-gupo pri informado.

Renato Corsetti

## Heredaĵo muzika

Amira Chun kantas "Heredaĵo";. la kantotekston verkis Ewa Grochowska.
Ĝin muzikigis Liven Dek kaj harmonizis Antero Ávila.

https://youtu.be/cEVW0r2XxLE

mga

## IKEF pri la ĉinaj fervojoj

Dankon pro via aŭskultado ĉe la 79-a DK, kiu rakontas laborstaton de ĉina konduktoro unu vagon-deĵoron tra la  kvar sezonoj. Jen sube estas la fina paĝo: *memorante antaŭ jaroj mi prelegis pri dizelaj lokomotivoj uzitaj kaj eksporteblaj al aliaj landoj. Tiu ideo venis de rumania pensiulo kaj e-isto, kiu laboris en privata transporta fervojo uzanta ĉinajn uzitajn lokomotivojn restintajn stoke post la ĉina fervoja elektrizado. Mi alvokas ke ĉiuj eblas prelegi en DK siajn interesaĵojn. La komerco unue estu ideo, kiun vi volas prezenti al aliaj. Pro tio en la ĉina lingvo la vorto 'Komerco' = Naski ideon.

Chielismo




## Hodler en Mostar

Jen ero el la plejlasta komuniko de ESF

Alessandra Madella: Pri "Hodler en Mostar" – intervjuo kun Spomenka Štimec https://esfconnected.org/2022/08/29/pri-hodler-en-mostar/

## Plia poezia paradizo

Plezuro por amantoj de poezio. Alkroĉita estas 'Penseo 371' el Ĉinio.

========= vortoj: 1330 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.